absolute nemanĝeblaj – se ne rikoltitaj dum majo, junio, julio kaj aŭgusto (kiuj monatoj **ne** enhavas "r" en la monatonomo)... (2003-10-06)

(**Rim.** Por redaktanto de esperantlinga revuo dum redaktado de supra sciindaĵo la malfacilaĵo komenciĝas jam pro la ĉiama problemo de "bona esperantigo de landnomoj"...)

**Ŝajnigi sin stulta** – germanlingve *"sich dumm stellen"*, itale *"fare l'indiano"*

Tiu ĉi proverba dirmaniero, kiu signifas "tiel fari, kvazaŭ oni tute ne komprenas", havas laŭdire vere amuzan devenon. Kiam post la krucaj militiroj la unuaj "negroj" (tiel oni nomis kaj arabojn kaj afrikanojn kaj hindianojn) venis la unuan fojon en Venecion, oni alrigardis ilin samamaniere kiel ni hodiaŭ verŝajne alrigardus iujn marsanojn de nia ruĝa najbarplanedo. Kompreneble, ke iliaj konduto kaj vestiĝmaniero faris ilin objekto de scivolemo. Tio plialtiĝis al vera sci-avido, kiam la "negroj" (en la germana lingvo *"Mohr"*, itale *"indiano"*) tute ne komprenis iun ajn vorton kaj pretendis, ke ili nenion konceptas pri tio kio ĉirkaŭas ilin. Tio tamen estis nura ruzaĵo, kiun ili uzis por gajni pli da libero por celfirme daŭrigi la intertraktadojn. (2003-01-18/19)

(**Rim.** Ĉu eble ekzistas en la estonte pli kaj pli kunkreskanta Eŭropa Unio iu lando, kiu ruze "ŝajnigas sin nekapabla, do stulta, lerni alian lingvon krom la propranacian" – por ke ĉiuj ali-lingvaj eŭropanoj lernu ties nacian idiomon kiel "ĉie parolatan internacian lingvon"?)

**Nekanonaj apokrifoj** – kiuj fariĝis kredoefikaj

Sub "apokrifaj skribaĵoj" oni komprenas la evangeliojn, leterojn, apokalipson kaj aktojn, kiuj dum la unuaj postkristaj jarcentoj cirkulis, sed ne estis alprene akceptitaj en la kanonon de la Nova Testamento. Por forigi tiajn skribaĵojn unuafoje kaj por ĉiam, fine de la 5-a jarcento estis metata sur ilin papa anatemo. Tamen ili tute ne restis sen influo.

Do, ekz. nur el la apokrifa "Petro-akto" ni scias, ke Petro iris al Romo. Kaj kredante tion, oni konstruis la preĝejon S-ta Petro super lia tombo. Ankaŭ pri la martira morto de Paŭlo ni scias nur pere de la "Paŭlo-akto". Same, nur la apokrifa *"Transitus Mariae"* raportas pri la ĉieliro de Maria. Kiam papo Pio la XII-a en 1950 proklamis la koncernan dogmon, li certe eĉ ne menciis vorteton pri la anatemita apokrifaĵo... (2003-09-20/21)

(Fonto: Ĉiuj sciindaĵoj de tiu ĉi "Scienca eĥo" en paĝoj 217-220 estas prenitaj el *Brockhaus*-kalendaro 2003 "Kio tiel ne troveblas en la leksikono" (*"Was so nicht im Lexikon steht"*) kun indiko de la koncerna folio-dato je la fino)



*Konferencoj*

**14-a IMEK de UMEA**

Pro kio "bonas" konferenco? 1. Pro tio, ke la temo estas bona kaj aktuala; 2. pro tio, ke la organizantoj kaj prelegantoj estas entuziasmaj kaj 3. pro tio, ke la fakaj kunsidoj kaj konferencaj aranĝoj estas bonaj kaj efikaj.

Post tiuj ĝeneralaĵoj mi prezentas nian 14-an Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon (IMEK), kiu okazis en *Oradea* / Rumanio inter la 14-a kaj 19-a de julio 2003 sub la temo "La medicinaj sciencoj je la komenco de la XXI-a jarcento" – do, bona kaj aktuala temo. Ĝi altiris sepdekon da kuracistoj kaj paramedicinaj fakuloj el Rumanio, Hungario, Pollando, Germanio, Bulgario, Ĉeĥio, Japanio, Ruslando, Ukraino – bona kaj entuziasma partoprenantaro. La organizantoj perfekte zorgis por tranoktado kaj komuna manĝado en la universitata studenthejmo – bona kaj entuziasmega etoso. La kulturaj aranĝoj sub la organiza talento de *István Budahazy*, kaj la fakaj prelegoj sub la sperta gvidado de d-ro *Imre Ferency*, prezidanto de Universala Medicinista Esperanto-Asocio (UMEA) – elstaraj kaj interesaj. La konferencaj aranĝoj inkluzivis 45 fakajn prelegojn, orgenan koncerton, ekskurson al "groto de ursoj", viziton de kuracad-banloko *"Felix"* – bonaj, fakspertaj kaj efikegaj. Kaj la programa kajero, kvazaŭ scienca publikigaĵo per si mem kun resumo de pli ol 50 medicinistaj kontribuaĵoj – bonega kaj valora aldono al la hejma pri-esperantaĵa librobreto.

Tiom multaj "bonoj" en faka rilato kun la perfekteco en organiza rilato jam nun instigas, ĝoje atendi (kaj partopreni!) la 15-an IMEK, post 2 jaroj...

*János Csapó (RO)*

**SUS-26 de AIS**

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino okazigis sian 26-an Sanmarinan Universitatan Studsesion (SUS) en tiu ĉi jaro (lige al sia 9-a itala studsesio) en *Rimini* / Italio kaj *San Marino*, de la 30-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro 2003. La programo entenis sciencajn kursojn (por akiri studunuojn) en la sekvaj fakaj kampoj: kibernetiko, humanistiko, struktursciencoj, natursciencoj kaj morfosciencoj.

Kongresejo por la sciencaj aranĝoj estis la lernejo *"Dante Alighieri"* en Riminio. Por la komunaj kunsidoj kaj forumo AIS uzis la samajn ejojn, kiujn ankaŭ uzis Internacia Katolika Unuiĝo de Esperantistoj kaj Kristana Esperanto Ligo Internacia por sia – ĝuste samtempa kaj samloka – 16-a Ekumena Kongreso (en kiu partoprenis ĉ. 250 esperantistoj el 18 landoj). Dum IKUE kaj KELI fiere anoncis sian eklezian unuecon per Esperanto-flago kaj grandaj afiŝoj ĉe la preĝejo, AIS ne plu - bedaŭrinde - atentigas pri